



Trezoroj de Sinjorino Aŭtuno

Aŭtorino: Anna Rudawcowa

Esperantigis: Krystyna Grochocka

- Mi ne ŝatas aŭtunon! – diras laŭte Injo. – Mi malŝatas ĉi tiun grizan malbonan virinon! Panjo, preperante matenmanĝon ridetis indulgeme. – Domaĝe! Ĉar la Sinjorino Aŭtuno amas infanojn kaj siajn la plej valorajn trezorojn alportis al ili kiel donacon. Injo vaste malfermis la okulojn.

- Trezorojn? Kiujn, panjo? Kie?

- Manĝu matenmanĝon kaj iru en nian fruktejon, eble vi trovos ilin – diras panjo.

Interesita Injo rapide eltrinkis lakton kaj post momento ŝi estis jam en la fruktejo. Sed kio estas tio?

Renkonte iras belega virino. Ŝi havas purpuran robon kaj orkoloran mantelon. Sur ĉarmaj kaŝtankoloraj bukloj brilas girlando el oraj folioj kaj vualo el delikatna araneaĵo. Bonaj, grizaj okuloj rigardas Injon kun rideto.

Bonan tagon, Injo! – diras per melodia voĉo. – Mi estas Aŭtuno, malbela, malbona, griza megero, laŭ via opinio... Injo ruĝiĝis. Ŝi ne scias kion respondi. Sinjorino Aŭtuno ridas arĝentsone kaj karesas per delikata mano mallevitane kapeton de la knabineto. – Ne hontu, etulino, kaj ne malĝoju! Rigardu, mi vestis la fruktejon por via veno per la plej belegaj trezoroj.

Injo rigardis kaj vidas, ke arboj eĉ kurbiĝas sub pezo de grandaj sukaj fruktoj. Ĉi tie ruĝiĝas, kiom sango, pomoj, tie oriĝas imponaj, bonodoraj piroj. En alia loko malhele bluaj, veluraj prunoj okulumas inter folioj kaj eĉ petas por preni ilin en buŝeton! Sub la arboj kaj inter branĉoj moviĝas multe da etaj strangaj hometoj kun arĝentaj flugiletoj. – Tiuj estas miaj Servistetoj - Fantometoj – klarigas Sinjorino Aŭtuno. – Ili gardas fruktojn dum maturiĝo, kaj ili delikate malsuprenpuŝas la plej maturajn sur teron. - Sed, ne tro delikate! – subite vokas Injo.

Ĉar en ĉi tiu momento unu Fantometo trafis per pomo en la nazeton de la knabineto. Sinjorino Aŭtuno minacis al petolulo.

- Bonaj estaĵoj kaj laboremaj, sed ili ŝatas petolaĵojn! Kaj hodiaŭ ili havas precipe multe da laboro, ĉar estas la tempo de fruktokolekto. Prenu la korbon, Injo, kaj helpu al mi iomete. Se vi volas. Kompreneble! - ĝojis la knabineto. Kaj post momento ŝi moviĝas sub la arboj kune kun la aro de etaj hometoj.

Kaj Sinjorino Aŭtuno diras kun rideto: Mi vidas, ke vi estas kontenta pro mia donaco. Por longa tempo sufiĉos al vi ĉi tiuj trezoroj. El parto de fruktoj via panjo fritos konfitaĵojn. Aliajn ŝi konservas en fojno, por ke vi havu dum la tuta vintro la freŝajn pomojn kaj pirojn. Vi vidas, ke mi ne estas tiom malbona kiom vi pensis.

Injo interrompis laboron kaj rigardis kun honto en belegajn okulojn de Aŭtuno. Sinjorino, vi estas belega kaj tre bonkora! Mi ĉiam amos vin. Kaj viaj trezoroj estas grandiozaj kaj pro ili mi tre, tre dankas al vi.